6-a Jaro N-o 297 APERAS SEMAJNE Leipzig, 12./6. 1930




ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerßner

## KIAM NI ATINGOS LA KVINAN MILON?

*Jen demando, kiu estiĝis tute spontane en nia interno, kiam la Administranto transsendis al ni la ĉi sube presitan artikolon.* ***Kiam ni atingos la Kvinan Milon?*** *Tiun demandon ni ripetas laŭte k senhezite antaŭ la publiko: nia legantaro. La statistika tabelo de nia Administranto, tiom utila, tiom klara, tiom instrua, montras al ni la spegulon de l' pasinto, la atingojn de nia laboro ... Sed ĝi diras al ni plion ankoraŭ; ĝi instruas al ni, kion ni povos atingi en tre proksima estonto, se ĉiu priatentas la mankojn elmontriĝantajn en tiu tabelo, se ĉie, kien ĝis nun apenaŭ trafis la puŝo de nia agado, ekstaras sindonemaj, kapablaj, spertaj varbantoj por rikolti riĉajn fruktojn sur la nesufiĉe prilaborita grundo. Jes, tion instruas al ni la statistiko: ni povos post ne tre longa tempo atingi la Kvinan Milon da abonantoj, se ĉiu K-do estos varbanto, agitanto, laboranto por nia movado, por "S-ulo"!* *RED.*

Pasis la vintro, la epoko plej vigla en la esperantista vivo. En multaj lokoj sur la tuta terglobo oni malfermis kursojn, instruis esp-on, por alkonduki novajn disĉiplojn al nia movado. Certe multon oni faris; ne nur en laboristaj rondoj, ankaŭ ĉe la burĝoj oni fervore propagandis k aranĝis sukcesajn rapidkursojn (mi pensas pri la "Ĉe-metodo"): novaj esperantistoj kvazaŭ kreskis el la tero kiel fungoj ...

Ankaŭ en "S-ulo" oni skribis lastvintre, ke oni volas aranĝi konkurojn en la varbado de novaj membroj k abonantoj. Vere bona intenco! Sekve de tiu skribado ni en la Administrejo tage k nokte cerbumis pri la kvanto de l' eldonota jarlibro (1929/30). Kaj, ĉion detale k funde konsiderinte, ni venis al la konkludo, ke ni nepre devas eldoni pli da ekzempleroj ol kutime.

Sed hodiaŭ, kelkajn monatojn poste, ni devas konstati la fakton, ke tiu "konkurado" ege lamas. Se oni komparas la kvanton de lernantoj (laŭ raportoj en la "Kroniko" de l' diversaj esperantaj gazetoj) kun la finbakitaj esperantistoj, tiam oni rajtas demandi: "Ĉu ni faras nian devon en la novaj kursoj?" Ni opinias, ke ne. Ekzistas instruantoj, kiuj absolute nenion mencias pri aplika aparato, pri SAT.

Ni povas konstati laŭ la Jarlibro, ke ekzistas lokoj, en kiuj, antaŭ kelkaj jaroj, nur estis 1 esperantisto, k kie hodiaŭ tiu sama izolulo reprezentas nian Asocion. Ŝajne li neniam intencis instrui esperanton. Vere, ekzistas esperantistoj, kiuj efektive estas fieraj, ĉar ili estas solaj en sia loko, k tute ne deziras, ke alia ankaŭ sciu la lingvon ... Kiam la poŝtisto alportas leterojn k poŝtkartojn el ĉiuj partoj de la mondo, oni ja taksas tiun esperantiston kiel eminentan k tre inteligentan homon. La tuta loĝantaro parolas pri li; oni konsideras lin kiel "malgrandan reĝon"; sed klopodojn por instrui la samlokanojn li ne faras, ĉar poste eble, tiuj instruatoj fariĝus konkurantoj-"reĝoj".

La esperanta movado finfine trovas grundon ankaŭ ekster Eŭropo. El ĉi suba tabelo niaj legantoj informiĝu pri la stato de l' abonantoj al "S-ulo" en la diversaj landoj, k ili konstatu la kreskon (aŭ malkreskon) post unu jaro per kompara tabelo pri la stato en pasinta jaro je sama dato. Por ne havi malĝustan bildon pri la abonantoj en Francio, ni atentigu, ke en tiu nombro estas entenitaj la ekzempleroj por la Asocio k Redakcio[1], sume 100 "S-ulo" k 60 "LNE". Same estas entenitaj la recenzekzempleroj, dissendataj de l' Administracio, proks. 10 ekz.

La kreskado de "La Nova Epoko" estas tre malregula; ĉi-jare ni eĉ devas konstati malkreskon de abonantoj al tiu nia revuo.

La unua nombro rilatas al stato je 23. 5. 29 (n-o 242 de "S-ulo" k "LNE" de majo 1929); la dua rilatas al stato je 21. 5. 30 (n-o 294 de "S-ulo" k "LNE" de majo 1930).

[1] Por ke ĉiu ĝuste komprenu, necesas aldoni, ke tiuj ekz-oj servas kiel prov-, recenz- k ŝanĝ-ekz-oj. La neuzitaj restas en la Arkivejo. La Gvidanto, la Redaktoro k ĉiuj Parizaj Plenum-Komitatanoj ja pagas sian abonon. — *Red.*

**NE ATENDU PLI LONGE**

por abonigi vian kurslernanton, vian korespondanton, vian laborkunulon esperantistan al

**SENNACIULO**

Kunhelpu ankaŭ vi, ke la **810** mankantaj abonantoj estu varbataj por

**PLENIGI LA 5-an MILON!**

| LANDO | "Sennaciulo" | | "La Nova Epoko" | |
|---|---|---|---|---|
| | 1929 | 1930 | 1929 | 1930 |
| Afriko . . . . . . | 1 | 3 | 1 | 1 |
| Alĝerio . . . . . . | 6 | 4 | — | — |
| Argentino . . . . . | 19 | 12 | 16 | 11 |
| Aŭstralio . . . . . | 1 | 3 | 1 | 1 |
| Aŭstrio . . . . . . | 212 | 215 | 72 | 54 |
| Belgio . . . . . . . | 82 | 78 | 45 | 34 |
| Brazilio . . . . . . | 1 | 4 | 2 | 4 |
| Britio . . . . . . . | 170 | 197 | 60 | 56 |
| Bulgario . . . . . | 5 | 5 | 27 | 26 |
| Ĉeĥoslovakio . . . | 122 | 157 | 30 | 37 |
| Ĉinio . . . . . . . | 3 | 2 | 3 | 2 |
| Ĉilio . . . . . . . . | 1 | 1 | 1 | 1 |
| Dancigo . . . . . . | 4 | 2 | 1 | 1 |
| Danio . . . . . . . | 3 | 7 | 1 | 2 |
| Egiptio . . . . . . | — | 1 | 1 | — |
| Estonio . . . . . . | 18 | 30 | 10 | 9 |
| Finnlando . . . . | 22 | 20 | 13 | 10 |
| Francio . . . . . . | 285 | 325 | 133 | 130 |
| Germanio . . . . . | 1034 | 1134 | 231 | 182 |
| Grekio . . . . . . | — | — | 1 | — |
| Hindio . . . . . . | — | 1 | — | 1 |
| Hindo-Ĉinio . . . | 1 | 1 | 1 | 1 |
| Hispanio . . . . . | 78 | 111 | 34 | 42 |
| Hungario . . . . . | 5 | 68 | 1 | 2 |
| Islando . . . . . . | 2 | 1 | 3 | 1 |
| Italio . . . . . . . | 1 | 1 | 1 | — |
| Japanio . . . . . . | 61 | 68 | 48 | 54 |
| Jugoslavio . . . . | 35 | 15 | 18 | 8 |
| Kanado . . . . . . | 9 | 6 | 6 | 3 |
| Kubo . . . . . . . | — | 2 | — | 1 |
| Latvio . . . . . . | 22 | 9 | 13 | 6 |
| Litovio . . . . . . | — | 3 | 1 | 1 |
| Luksemburgo . . | 1 | 1 | — | — |
| Maroko . . . . . . | 1 | — | — | — |
| Meksikio . . . . . | — | 1 | — | — |
| Nederlando . . . . | 104 | 120 | 23 | 29 |
| Norvegio . . . . . | 24 | 31 | 9 | 7 |
| Oceanio . . . . . . | 1 | 2 | — | — |
| Persio . . . . . . . | 1 | 2 | — | 1 |
| Polio . . . . . . . | 62 | 94 | 31 | 40 |
| Portugalio . . . . | 16 | 18 | 7 | 8 |
| Rumanio . . . . . | 9 | 8 | 2 | 2 |
| Saarlando . . . . | 5 | 7 | 1 | 1 |
| Sovetio . . . . . . | 1045 | 1116 | 439 | 403 |
| Svedio . . . . . . | 113 | 185 | 35 | 32 |
| Svisio . . . . . . . | 29 | 33 | 10 | 11 |
| Turkio . . . . . . | 1 | 1 | — | 1 |
| Urugvajo . . . . . | 2 | 1 | 2 | 1 |
| Usono . . . . . . . | 55 | 84 | 18 | 28 |
| | 3672 | 4190 | 1352 | 1245 |


Kion montras al ni tiu ĉi tabelo? Ke en multaj landoj, eĉ en tutaj terpartoj, nia movado — verŝajne ankaŭ la burĝa — estas tute sensignifa. Ekzemple en Grekio ni ĝis nun ne havis SAT-membron k ankaŭ ne abonanton al "S-ulo", kvankam SAT jam ekzistas 10 jarojn. Alie oni povas konstati malgrandan kreskon de l' abonantaro, k ĝuste en landoj kiel Svedio, Anglio, Nederlando, Hispanio k. a. niaj varbantoj bone laboris. Konsiderante Germanion k Sovetion oni devas konstati, ke kompare al la ĝenerala tiea stato k kondiĉoj de l' esperanta movado, la kresko de nia abonantaro en tiuj landoj dum la daŭro de l' lasta jaro tute ne estas kontentiga.

Alia afero estas nia stato en la terorlandoj. Certe ni havus tie multe pli grandan nombron de abonantoj, se la cirkonstancoj por disvastigo de niaj organoj en tiuj landoj estus pli favoraj k superfluas paroli pri tio en la kadro de ĉi tiu artikolo. Se ne ekzistus la baroj de l' cenzuro, la konfiskoj, la persekutoj al niaj K-doj en tiuj landoj, ni jam delonge havus 5000 abonantojn al "S-ulo" . . . Sed ĝuste ĉi tiu aparta kondiĉaro en la terorlandoj estu nia instigilo por agiti tiom pli fervore en la aliaj landoj! Neniu esperantisto restu sen informo pri SAT, neniu esperanta kurso ekzistu en la tuta mondo, en kiu ne okazu konigo kun nia movado, kun niaj eldonaĵoj . . . Ĉien penetru niaj varbantoj k propagandu pri ni!

Se vi havas esperantistajn konatojn k amikojn, kiuj ne jam abonas al "S-ulo", informu nin, donu al ni iliajn nomojn k adreson, k ni senprokraste sendos al ili provekzempleron de nia gazeto, nian libro-katalogon k ĉion, kion ili bezonas por esti alkondukataj en nian tendaron. *Administracio de SAT.*

# LA STOKHOLMA EKSPOZICIO

La art-industria ekspozicio de Stokholmo malfermiĝis je la dato difinita. Kaj ĝi estis tiam tute preta. La ekspozicio montras loĝejan kulturon de la svedoj k la loĝejarton, artmetion k artindustrion rilatantan al la cirkonstancoj de loĝejo. La ekspozicio ŝajnas al unufoja vizitanto stranga kun siaj konstruoj memorigantaj pri ŝipaj ferdekoj, sed ĝi situas belege je ambaŭ flankoj de golfo. Ne estas eble ĉi tie priskribi ĉiujn vidindaĵojn, sed la plej atentindaj estas la planetario (planedobservejo) de Cajs (*Zeiss*) en Jena k Sveda regno (statistike farita pritrakto de la sveda kulturo en tre humorplene farita maniero). La domoj konsistas el fero k vitro k la granda ĉefrestoracio povas servi samtempe al du mil manĝantoj. Ankaŭ akvario tiras al si la atenton kun siaj multaj specoj da salakvaj k riveraj fiŝoj k bestoj, vivantaj en la akvo.



Nur tiu, kiu vojaĝis tra Svedio, scias kiajn bonajn triklasajn vagonojn la ŝtato havas en siaj vagonaroj. En la ekspozicio oni havas okazon vidi tiajn vagonojn. En multaj haloj oni vidas specimenojn de la diversaj objektoj, kiujn oni uzas en la loĝejoj, keramiko, glasoj, tapiŝoj, objektoj el karaj k malkaraj metaloj, instrumentoj por muziko, ktp. En unu el la haloj montras la sveda Ruĝa Kruco sian agadon, en alia oni vidas popollernejan instalaron.

Unu sekcio de la ekspozicio estas dediĉita al la vilaa (kampodometa) arkitekturo, k montras kiel malkare konstrui domon por unu familio. La haloj k la ekspoziciaĵoj estas enkadrigitaj en ĉarma floraro k verdaĵaro. En la mezo de l' ekspozicio staras granda masto, alta je 80 metroj, kiu lumas en la vespero en diversaj koloroj, k en la golfo estas tre bela luma fontano, kiu diversformiĝante brilas en ĉiuj koloroj de la spektro.

Por prizorgi la multajn fremdulojn, kiuj anoncis sian alvenon, oni faris grandajn klopodojn. Precipe por ni esperantistoj estas ĝoje mencii, ke tiel la ŝtato kiel la tramkompanio de Stokholmo komprenis la gravon de nia lingvo, starigante kursojn en esperanto por tramistoj k telefonistinoj. La tramistoj deĵorante portas markon, kiu anoncas scion en respektiva lingvo. Kaj per telefonilo oni povas alvoki numeron en esperanta, angla, franca, germana k hispana lingvoj.

Svedaj luprezoj por loĝejo ja estas preskaŭ plej altaj en la tuta mondo. La ekspozicia estraro pro tio faris kelkajn kontrolajn aferojn, por ke oni ne pagu tro multe, estante en la sveda ĉefurbo dum la ekspozicio. Oni starigis specialan loĝigan komitaton, kiu zorgas, ke ĉiu vizitanto, kiu deziras, povu havi helpon per ĝi. Se alvenas SAT-anoj ili bonvole turnu sin al red. John Johannsson, Högbergsgatan 64 nb., *Stockholm S.*, k li laŭpove helpos al ili.

Laŭ sciigoj el kelkaj landoj la esperantistoj intencas karavane viziti Stokholmon dum la somero. La laborista klubo de Stokholmo kunvenos dum la tuta somero ĉiun vendredon en sia ejo, Sankt Eriksgatan 68, kie ŝildo en esperanto estas videbla. En la ekspozicio troviĝas Gek-doj sciantaj esperanton ktp. *SAT-ano 13 131.*

**N. LENIN:**

**Ŝtato kaj Revolucio**

150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g.

Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT



## Klarigoj, komentoj, respondoj

### La urbo Rotterdam

Al la artikolo de K-dino *Tr. Vreeswijk* sub supra titolo en n-o 294 mi faru jenajn aldonajn k klarigajn rimarkojn: La ĝenerala priskribo de l' urbo donas bonegan impreson pri ĝia vivo k internacia signifo. Parolante pri la drinkdiablo nia K-dino kritikas, ke ne unuavice oni helpas la infanojn. Mi ne speciale volas kritiki tion, sed atakante la kapitalisman socian sistemon konstati, ke fakte ĉi tiu sociordo povas nur iomete helpi al la viktimoj de la drinkdiablo, la prostituo, la mizera loĝado, la kreskanta senlaboreco ktp. La kapitalisma ordo devus ataki sin mem, se ĝi volus provi funde forigi tiujn malbonojn.

Alilandaj K-doj ankaŭ ne komprenos la signifon de Komunista Partio "Visser" k Kom. Partio "Holland". K-do de Visser estas reprezentanto de la kompartio (sekcio de l' III-a Internacio). La "Holland"-Partio estis opozicia kompartio, kiu ĵus likvidiĝis post entute 5-jara ekzisto. *SAT-ano 13 610.*

### Kooperativoj kaj 1-a de Majo

Sepfoje mi festis la Unuan de Majo en kooperativoj de Ŝtetin (Stettin) k Magdeburg. Estis por ni ĉiam memkompreneblo, k ankaŭ la estraro ne kontraŭstaris. Nur unu fojon, kiam la 1-a de majo estis sabato, ni posttagmeze malfermis la disdonejojn, ĉar bedaŭrinde la konsumantoj ne estas sufiĉe bone edukitaj por ĉion aĉeti la antaŭan tagon. Ĉi-okaze la estraro intertraktis kun la sindikato k rezulto estis la supre dirita. *15 193, Magdeburg.*

## PATRIOTISMO

Estas kurioza afero konstati la manieron, kiel multaj homôj, precipe gvidantoj de popoloj, konsideras k gloras la vorton patriotismo.

La nuna turka respubliko kun hodiaŭ 13,7 milionoj da loĝantoj, kies plej granda aktiveco k meza vivmaniero, preskaŭ por 70% el ili, estas terkulturado sur areo de 762 736 kv. kilometroj, volas laŭ la instigo de sia registaro milite potenciĝi kiel dum la "bonaj tempoj" de la sultanoj. Cetere nun kun modernigitaj iloj. Efektive ili volas per nekonsenteblaj metodoj eltiri ie ajn profitojn k sub preteksto ŝirmi la produkton de tiu ekspluatado, krei vojojn, kiuj povas servi al ilia avido, al la riĉularo.



*Angla publiko admiras "sian" novan kirasitan patri-defendulon.*

La projektoj de militkonstruado por defendo de patrio en Turkio konsistas rilate al la maristaro el du potencaj kirasŝipoj, seso da krozŝipoj kun forto de pli ol dek mil milkilogramoj, proksimume 15 detru-ŝipoj, 4 submaraj boatoj k 6 minlokigaj ŝipoj. Por la terarmeo oni intencas havigi longatingajn pafilegojn, pafilojn, mitralilojn k ĉiujn nuntempe konatajn modernajn armilojn.

Kontraŭdiro k malpravo de l' patriotismo: Laŭ opinio de la tielnomataj patriotoj estas ĝuste, ke la registaro interesiĝu pri prizorgo de l' patridefendo k ke ĝi faru, por ke tio povu esti kiel eble plej malmultekosta k bona. Sed ni rigardu, de kie devenas tiuj provizoj.

Por konstruado de iuj militiloj Turkio jam malfermis konkurson, je kiu partoprenis kunhelpe Anglio, kun granda por tiu konstruado speciale taŭga firmo; Usono, kun granda kompanio; Francio kun propono de sindikato formita el 15 grandaj kompanioj; fine Italio, kiu venkis en la konkurado.

La instruo, kiun ni eltiras el tio, estas jena: Ĉiu lando, de kiu Turkio

## LA EVOLUO SEN DIO

(Daŭrigo. Vidu n-ojn 293/96.)

### La konsekvenco de l' Evoluo

La Evoluo ruinigas la Biblion

La evoluo senvalorigas la biblion. La scienca plano k la plano de l' reaĉeto el pekoj ne povas interakordiĝi. La religioj bazitaj sur la biblio fiaskas. La ateistoj celas fermigi al ili la butikon.

La Evoluo nuligas dion

Pli frue ol Darvin k antaŭ ol la termino "evoluo" estis uzata, la pastraro deklaris ĉian tiusencan teorion kiel malpian. La pastroj komprenis ĝian gravon. La teorio de l' pezoforto en astronomio, la principo de l' energio en fiziko, la atomteorio en ĥemio ekzilas la supernaturan el tiuj ĉi sciencoj — same la evolu-teorio pri la deveno de l' homo per la natura selekto ĉasas dion el la biologio.

La evoluo etendas la sciencan klarigon sur la solan regionon de l' naturo, de kie dio ne estis forpelita. La evoluo estas la ateismo: ĝi metas la naturleĝon je la loko de l' supernatura saĝo.

Gledston (*Gladstone*) skribis: "Sur la bazoj de tio, kion oni nomas evoluo, dio estas senŝarĝita de la laboro de l' kreo; je la nomo de l' neŝanĝeblaj leĝoj, li estas eksigita de la regado super la mondo." Evidente.

Estas la mekanika kvalito de l' natura selekto, kiu elvokas la religiajn kriegaĉojn.

La protestanta fanatiko

En la protestantaj landoj la ortodoksuloj organizas la kamparanan nescion rilate al la evoluo. Ilia strategio estas kvalifiki la evoluon kiel "simplan hipotezon" k ĝin ridindigi. Senigitaj je ĉia kulturo, ili nur scias rikani. La faktoj k la logiko havas nenian efikon je ili. Kiel Celz (*Celse*) elmontris en komenco de l' kristanismo: "ili nutras nin per fabeloj — fabeloj de maljunaj virinoj". Se la fabeloj porinfanaj pri feinoj troviĝus kiel konsistparto en ilia libro, ili trovus tie klarigon.

Sed ĉiuj iliaj klopodoj estas vanaj: ili neniam alkondukos la mondon por akcepti la pseŭdo-genealogion de l' homo tian, kian liveras la biblio. Ni scias tro multe pri tio por akcepti ĝin k la aliajn fabelojn atribuitajn al Jesuo. La nomitaj ortodoksuloj estas cetere modernistoj kompare kun la primitiva kristanismo, ĉar ili forĵetis multan pure biblian instruadon. Tio ne estas kreduloj, sed homoj, kiuj *aspektas* kiel kreduloj.

La katolikoj kontraŭ la Evoluo

La plimulto el la katolikoj malakceptas la evoluon. La gvidantoj de l' katolikismo eltranĉas ĝiajn radikojn — la spontanan generadon — k dehakas la ĉefan branĉon — la animalan pradevenon de l' homo. Ekzistas nenia katolika lernejo, kiu instruas, ke la homo devenas de l' simio.

En junio 1919 dekreto de l' biblia komisiono por la interpreto de l' sanktaj skriboj asertis la ne-evoluon de l' homa korpo.

Kaj la 25. marto 1920 la kardinalo Gib'n (*Gibbon*) skribis al P. L. Mils (*Mills*), aŭtoro de l' *Kreo kontraŭ Evoluo:* "Konsiderante la bedaŭregindajn difektojn plenumitajn en nia medio de l' nuntempa materialismo k la evoluo sen dio, mi povas fari nur bonan akcepton al via ŝatinda kontribuo por la defendo de l' alia vidpunkto. Persone mi estas konvinkita, ke la vivtagoj de l' darvinismo estas pasintaj."

"La darvinismo estas besta filozofio — alivorte dirite: ne ekzistas dio k la simio estas nia Adamo (kardinalo Manning)." — Tio estas trafa.

ricevis proponon, estis kontraŭ ĝi dum la granda milito k ĝiaj nunaj politikaj kondiĉoj restis la samaj. La principoj ne ŝanĝiĝis. Ĉiuj el la konkurantoj ja konsentas batali por la defendo de sia "patrio". Ankaŭ estas kurioze konstati, ke en la prezkonkurado venkis ĝuste tiu lando, kun kiu Turkio havis la plej oftajn bataloj en ĉiuj tempoj. Ne parolante pri la romaj tempoj, ni konstatas, ke post Lepanto (1571), kie kun duono aŭ pli de l' itala armeo estis aranĝata granda batalo; ĉiam la papoj celis malfortigi la Otomanan Imperion k samtempe la moralan influon de l' mahometana religio. Kaj preskaŭ ĉiam la papoj estis italaj princoj kun italaj interesoj. Aliflanke en 1911 Turkio perdis en sia sanga milito kontraŭ Italio Tripolitanion, la grandan kolonion, kiun havas hodiaŭ Italio en Nordafriko sub la nomo de Libio, kolonio, kiu ampleksas pli ol milionon da kvadratkilometroj. Fine dum pasintaj militoj italoj partoprenis en la bataloj faritaj kontraŭ la turkoj de l' angloj k francoj en Mezopotamio k Sirio.

Sed se tia mendo estas por la kapitalistoj en Turkio bona negoco, kun nekonata ankoraŭ profitakiro —, por la italaj kapitalistoj, oni pensas, ankaŭ la afero devus esti profitdona. Tute ne, ĉar nuntempe konfirmiĝis bonaj rilatoj inter la ekleziuloj k la itala registaro, ankaŭ konvencioj kun alireligiaj fremduloj, eĉ tute ne religiaj. Tia negoco ne okazis nur pro mono, flanke de Italio, sed por teni en aktiva stato siajn konstruejojn de militilaro. Tiel oni ne perdos iom da praktiko tiom necesa por burĝa armeo, sur kiu sin apogas la nuna sociordo. Tial venkis en la konkurso Italio kontraŭ Usono, Anglio k Francio. Nun ĉi tiu konstruas por Turkio 2 detru-ŝipojn kun forto de 1600 milkilogramoj, 2 submar-ŝipojn k kelkajn havenpafilegojn. Armiloj, kiuj eble sin turnos poste kontraŭ tiuj, kiuj ilin fabrikis.

*Herta M.*

# ANARKISMO PRI SENNACIISMO

— "Sed ni anarkistoj estas veraj sennaciuloj..."

Ne malofte mi aŭdis tiun aserton. Estas vere, ke en la anarkista literaturo oni povas trovi akrajn k trafajn kritikojn kontraŭ la Nacio, la Patrio aŭ la Ŝtato. Ankaŭ multe da banalaj frazoj pri tutmonda interfratiĝo k kunfandiĝo de l' popoloj. Sed ĉe multaj aŭtoroj neanarkistaj el la lasta jarcento oni same povas trovi tiajn frazojn. Ni jam publikigis kelkajn en la n-o 233 de "S-ulo". Kaj kiu havus tempon por serĉi en la antikvaj literaturoj de ĉiuj popoloj, tiu trovus multajn esprimojn pri tia malpli nebula aspiro de homoj al mondunuiĝo.

Sed fakto restas fakto, ke eĉ la anarkistoj, kiam ili penas prezenti bildon de socio anarkisme funkcianta, konsideras la Nacion en siaj planoj k ne parolas pri ĝia malaperindeco. Kaj tio cetere estas tute logika k neevitebla, ĉar neniu el la anarkistaj teoriuloj konsideris grava k atentinda la problemon pri starigo de simpla, logika, artefarita k mondskale parolebla lingvo; — ĉar neniu estis esperantisto!

Antaŭ la milito mi legis preskaŭ la tutan anarkistan literaturon k konservas bone en la memoro la konstaton pri tiu fakto.

Nun la termino *sennaciismo* estas diskutata k tre diverse komprenata aŭ klarigata. Mi do lastatempe volis kontroli, ĉu en postmilitaj verkoj de anarkistoj ne aperis novaj konceptoj pri la Nacio. Tiucele mi havigis al mi, interalie, libron de Sebastiano For (Faure) eldonitan en la jaro 1921. Ĝi estas titolita: *Mia Komunismo.* La aŭtoro priskribas socion, funkciantan en Francio post venkinta revolucio. Li supozas, ke personoj, kiuj elmigris antaŭ multaj jaroj, revenas en la landon, kie iu tieulo klarigas al ili la funkciadon de la nova sociordo.

La verko estas pli ol 400-paĝa k ne estas mia celo ĝin recenzi. Mi nur citu kelkajn partojn el la ĉapitro XXII, en kiu plej evidente troviĝas la pruvo pri mia aserto, ke anarkistoj, same kiel komunistoj k socialistoj, estas k povas esti nur internaciistoj k ne sennaciistoj:

---

"Ekzistas nenia signo de argumento, eĉ simple konjektebla, je favoro de l' animala origino de l' homo (*Katolika Enciklopedio,* en artikolo "Evoluo") — Reiro al la kategorio de l' piaj mensogoj.

Pio VI kondamnis akre la darvinismon.

### La mallojalo de l'Modernistoj

La Evoluo nuligas la pekliberigon. Posteuloj de simioj ne bezonas Savanton. Kial al ili prezenti Kriston krucumitan? Ĉu la simioj pekis?

"Se vi ne akceptas la atestaron de la biblio kiel konkludon, kian pruvon vi havas, ke dio ekzistas k ke la animo estas senmorta?" (Gledston) — Nenian.

De kiam homo malakceptis la biblion kiel parolon de dio, lia pli aŭ malpli alta grado da aliĝemo al la ateismo estas determinita per lia talento por hipokrito. La plimulto el la Modernistoj estas maskitaj ateistoj.

### La dio de l' "akordigantoj"

La "akordigantoj" batalas senespere por savi dion de l' pereo k akiras nur ridigajn rezultojn. La vortoj estas deturnitaj de sia senco, la faktoj estas ignorataj, la logiko estas flankenmetata.

"La kreado per la evoluo" estas ilia lasta devizo. Tio ne havas pli da signifo ol paroli pri la iro de l' rano aŭ de l' infano, kiu "kantas kriante".

La uzo de similaj esprimoj stampas homon malsaĝegan aŭ malsinceregan. La historio de l' hipokrito ne entenas pli nigran paĝon ol la liston da provoj faritaj por akordigi la sciencon k la religion.

Ekzistas poemo, skribita angle, kiu entenas tiujn ĉi du versojn:

*Some call it Evolution —*
*And others call it God.*

(La unuj nomas ĝin Evoluo —
k la aliaj nomas ĝin Dio).

Oni povas nomi artverko ŝlosilon por konserv-skatoloj. La evolu-teismo estas volonta misuzo de l' vortoj; ĝi havas la rangŝtupon de vortspritaĵo. La evoluo estas procezo. Kial konservi la terminojn de forlasita religio? Kian profiton vi ĉerpas el tio direkti viajn preĝojn al procezo, ho teistaj evoluistoj? Ŝparu vian spiron.

Venkitaj la teologoj deklaras nun, ke la evoluo estas pli alta, pli nobla, pli grandioza metodo ol la speciala Kreo priskribita en la Genezo.

Se la intenco de dio estis krei perfektan estaĵon, kial tiu ĉi multeco da krudaj provoj? Estas stulte kredi, ke la malrapida tutfarado de l' mondo per la ludo hazarda de l' evoluo estas metodo supera al la momenta kreo. La inteligento k la rapido ne estas malvirtoj.

La centro de l' doktrino pri la Evoluo estas la mortigo al la nekapablaj. Kaj *en kia maniero?* Ofte la mortigo akompaniĝas de abomenaj torturoj. La vivo nutriĝas per la vivo. Ni ne citos ekzemplojn, timante ke la akordigantoj povu koleriĝi pro la cito de l' kruelegaĵoj, kiujn permesas ilia dio.

"Ĉiuj malsanoj, kiuj estas konataj al ni, estas rimedoj, kiujn la naturo aplikas por elimini la neadaptiĝeman porcion de sia idaro.

"La ludo de l' kato, kiu amuzas sin per la muso, estas nenio kompare al la plilongigita sporto, pri kiu okupas sin la naturo, kiam ĝi mortigas la viktimojn de sia malmodera k senfina soifo je naskado. Metu dion post tiun aranĝon k vi kreas diablon pli potencan k pli malnoblegan ol kian iu teologio de l' pasinto kapablis inventi" (Fut — *Foote*).

La akordigantoj estas malestimindaj.

(Daŭrigota.) *Karlo Smith.*

— "Nia tuta komunista organizo sin bazas sur federa sistemo. Ĝi deiras de la Komunumo, transiras la Regionon k atingas la Nacion. Komunumo, Regiono k Nacio reprezentas tri federojn, kies unuoj estas pli k pli fortaj k kies rondo senĉese plilarĝiĝas:

"La Komunumo konsistas el la individuoj tie vivantaj.

"La Regiono, ĝi estas la federiĝo de la komunumoj, kiujn ĝi entenas.

"La Nacion konsistigas la Federiĝoj el la Regionoj.

"La Komunumo sin inspiras de la bezonoj k interesoj de la individuoj.

**KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"** ★

"La Regiono sin inspiras de la bezonoj k interesoj de la komunumoj.

"La Nacio sin inspiras de la bezonoj k de la interesoj de la regionoj . . .

— — — — — — — — — — — — —

"La Nacio ne devas enmiksiĝi k ne enmiksiĝas en la interna organizo k en la detaloj de la regiona vivo.

"La Regiono ne devas enmiksiĝi k ne enmiksiĝas en la interna organizo k en la detaloj de komunuma vivo.

"La Komunumo ne devas enmiksiĝi k ne enmiksiĝas en la interna organizo k en la detaloj de la familia vivo."

La aŭtoro, kiu sendube kredas, ke oni povas starigi socialismon en unu sola lando, ne parolas pri internacia organizado de la Socio. Sed estas evidente, ke se li tion farus, li dirus: *La Internacio, ĝi estas la federiĝo de Nacioj.* Ne povas esti dubo pri tio. Nenie en la libro estas eĉ supozite, ke la Nacio povas esti ignorata en plano pri organizado de Socio. La aŭtoro multloke parolas pri "Nacia konsilantaro", "Nacia Palaco", "Naciaj Komitatoj" ks.

Estas klare por ĉiu, kiu volas serioze esplori la dokumentojn, ke la anarkistaj teoriuloj ne povas esti konsiderataj eĉ kiel sennacianoj. Fakte ne ekzistas ankoraŭ tezaro praviganta k klariganta la sennaciismon. Tio estas la tasko de mondlingvanoj, de esperantistoj, de SAT-anoj. Sed por entrepreni tiun laboron, necesas unue ne havi la opinion, ke jam ĉio estas dirita pri soci-politikaj problemoj, ke Marks, Lenin, Kropotkin k. a. famuloj diris la definitivajn vortojn, ke la venontaj generacioj bezonos nur papage lerni iliajn teoriojn . . . *E. L.*

*Devas esti, ke estu sklavoj, por ke estu liberaj homoj, kapablaj pensi, rezoni k kulturi la artojn; sed venos la tago, kiam la sklavojn anstataŭas maŝinoj.* *Aristotelo.*

# LIBERA SEN-ANTAŬJUĜA MONDO

Iun vesperon, aŭtune, mi supreniris altegan monton. Fine, ĉe la supro, mi sidiĝis, rigardante la ĵus kuŝantan sunon; la nokto ekĉirkaŭis min k la tutan malsupre kuŝantan Teron.

Tiel mi restadis longe, side, sur altegaj rokoj; la okuloj senmove rigardis la nigriĝantan malproksiman ĉielon.

Krepuskis: Unu post alia ekaperis la steloj. Mi cerbumadis pri la mizero reganta la tutan homaron . . . subite, dum mi, per senmovaj okuloj, fikse alrigardis malproksiman steleton, ĝi ekiĝis, por miaj trompitaj okuloj, pli kaj pli granda, kvazaŭ ĝi estus ŝvelanta tiel ke, fine. mi povis vidi ĝian surfacon, kvazaŭ ĝi estus tre multe alproksimiĝinta aŭ kvazaŭ mi havus neeble akrevidajn okulojn.

Tiam mi rimarkis: tiu astro estas planedo, estas verá mondo; sed tiu mondo tute ne havas homojn nek bestojn; nur kreskaĵoj, arboj kaj herboj estis en ĝi.

La jaroj forpasis antaŭ miaj okuloj; jarcentoj, jarmiloj forruliĝis, k mi, tenata de l' potenca mano de l' Sonĝo, restadis senmova k sidanta, sur la altega monto, rigardanta tiun strangan mondon, kvazaŭ mi estus nemorteca, fabela dio.

Post transkuro de multaj jarmiloj aperis sur ĝi pluraj, ĉiuspecaj bestoj; fine ankaŭ homoj ekiĝis sur ĝi; sed, krom la homa eksteraĵo ili neniel similis la Teran homon — ili vivis kiel la bestoj. Tio daŭris multajn jarcentojn: por satiĝi sufiĉis, ke ili etendu la manon al la abundaj frukt-arboj; kiel la bestoj, kiel la birdoj ili vivas laŭ-nature — ankaŭ vestaĵojn ili ne uzas.

Dumnokte k eĉ tage, kiam el la ĉielo falas pluvo, kiam fulmotondras, kiam estas vento k malvarmo, ili facile trovas ie: ĉu rokajn kavernojn, ĉu grandajn truojn ĉe arboj, ĉu iun ajn kaŝejon, kie ili povus sinŝirmi aŭ kontraŭstari al la maldolĉa, malmilda vetero.

Tial ili ne bezonis migri malproksimen; sed la disvolviĝon de tiu homaro okazigis manko je manĝaĵoj; tiam ili fariĝis migremaj . . . Forpasis pluaj jarcentoj, tiam ili spertis pri la kreskado de l' utilaj, manĝeblaj vegetaĵoj. Ili komencis tiam faciligi ilian disvolviĝon. Ekiĝis la terkulturado. Por defendi sin de la uraganoj ktp., ili ekkonstruis loĝejojn.

La bezonoj pensigis ilin. Pro la vivbezonoj ili fariĝis elpensemaj: ankaŭ korpokovrilojn ili elpensis por kontraŭstari la iafoje akran malvarmon: ne pro honto vidi sian nudan korpon; tial, kiam la suno varme dissendas siajn orajn radiojn, kiam ili banas sin, ĉu en maro, ĉu en rivero, ili tute formetas siajn vestaĵojn. Pro ilia laŭnatura vivo, iliaj fortikaj korpoj aspektis kiel Apoloj ĉe la viroj, kiel Venusoj ĉe la virinoj. Ili multobliĝis, k, pro la multobliĝo, ili rimarkis novajn bezonojn; tial, ili elpensis maŝinojn ili fariĝis laboremaj k sciencemaj. Sed . . . mirinda fakto! — Ili uzis ĉiam la produkton de sia laboro por la feliĉo k bezonoj de ĉiuj kunhomoj. Ĉiam ili uzis sian sperton k laboremon, saĝon k sciencon por tuthomara profito. Neniam ekkaptis ilin la ideo forkaŝi sian sperton aŭ sian kapablon por ilin ĝui for de la ceteraj kunhomoj. Neniam ili pensis malutili kunulon aŭ subpremi ĝin. Nek mizero nek perforto, nek estro nek subulo estis inter ili . . . nek iu ajn simila malhelpo! . . . Tiu sana k justa vivo ŝajnis al mi miriga k dezirinda . . .

Ekkaptis min la deziro alflugi tiun mondon, forlasi tiun, kie mi vivas k ĝui la feliĉon de la alimondanoj . . . sed, malfeliĉo: Tio estis nura sonĝo . . . mi vekiĝis: tiu mondo foriĝis, malaperis.

Mi ĉirkaŭrigardis: Nokto k mallumo. En la ĉielo tremlumis steloj, multaj steloj . . . Ĉu estus tra la spacoj simila mondo, kie la homaro disvolviĝas sen militoj profitante la naturajn fortojn komune, fratece? . . . senresponda demando!

Kial nia mondo ne estas iom simila al tiu sonĝita mondo? . . . Se almenaŭ mi povus eterne, senvekiĝe sonĝadi min vivanta en tiu sonĝa, reva, fantazia mondo . . . sed estas neeble . . .

Mi denove ĉirkaŭrigardas: mallumo, malhelo ekforiĝas; matena krepusko, aŭroro! Reiru al nia mondo, malsupren . . . Kion mi faru?

Ĉu labori? Jes, labori . . . sed labori, klopodi, peni, por ke nia mondo similiĝu al sonĝa, ideala mondo; por ke sur Tero ne plu estu mizero, mensogo, milito, malamo k malbono!

Ni ĉiuj al laboro, ekprovu, diligentu senlace, senĉese, ĝis ni sukcesos aŭ morto forrabos nin! . . .

Poste venos hela tago, varma suno, vigla vivo; la kampoj verdiĝos, krevos floraj burĝonoj, la birdoj kantos . . . estiĝos bela k ĉarma la vivo!

*SAT-ano 15 367 (Lisbono).*

**Baldaŭ aperos**
esperanta originalo
**ILI**
**de LEON BERGIERS**
80 paĝoj. Formato: 17×21 cm.
Kovrilo ĉukolora, kun pluraj ilustraĵoj de Lucien Gilles k fotografaĵo.
Prezon ni konigos en unu el la venontaj n-oj. Atentu!
**Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O. 27.**

# Esperanto-Servo

N-o 37 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 12. Junio 1930

## EL USONO

### Senarmiga praktikado

256 (Esp.-Servo.) *12. majo.* Gazetoj raportas, ke en la parlamento oni ekdebatis pri la Londona malarmigo. Malaprobita estas, ke Anglio havu saman nombron da ŝipoj kiel Usono.

*13. majo.* Katolika kardinalo de Novjorko-Hayes sanktigis (per 'sankta' akvo) k benis nuntempe en ĉi-tiea haveno troviĝantajn imperialistajn ŝiparojn kune kun ĉiuj armiloj k oficiroj (evidente simplaj maristoj ne estis benindaj). Jen rolo de religio: sanktigi, subteni, helpi al la subpremantaro.

*14. majo.* Belega tago, la suno brilas. Mi aĉetas gazeton k legas, ke laŭ militministeria plano oni en kuranta jaro perfektigos ¼ milionon da homoj en diversaj militservoj. Pro kio ja okazis la senarmiga konferenco en Londono. La paco estas perfekta — laŭ kapitalistaj gazetoj. Tio estas sensencaĵo. — ... La aer-tramo ekstaras, ah, jes, mi alvenis ĉe la oceana bordo. Ni alvenas k rigardas la grandegajn ŝipojn, ni vidas grandegan amason, aŭdiĝas kriadoj, policistoj kuradas al iu direkto, ni ankaŭ kuras tien. Jen policistoj kaptas laboristinon 16—18-jaraĝan. En manoj de maristoj estas flugfolioj, disdonitaj de la junkomunista ligo. La flugfolioj klarigas al la soldatoj, ke ilin oni uzos kiel kanon-celaĵoj dum venonta milito, ke ili batalos por interesoj de Morgan, Rockefeller, Wall-Street-bankistoj. Oni avertas ilin, ne uzi la armilojn kontraŭ siaj laborfratoj, sed turni ilin kontraŭ siaj malamikoj — kiuj estas la kapitalistoj. La maristoj ĉirkaŭstaras la policon, kiu arestis la junkomunistinon. Ŝi estas enpuŝata en policaŭtomobilon, la policistoj forveturas. — Vespere en nia najbareco aperas 18-jara maristo usonhungara. Ni parolas kun li. Li diris "... estis la kaŭzo ke mi soldatiĝis, ĉar mi ne estis tute saĝa, sed hodiaŭ mi jam multon spertis". Lia parenco, espisto SAT-ano klarigas lin kiel sin konduti, li atenteme aŭskultas, k fine li diras, ke kiam estos pasinta lia servotempo, li forlasos la armeon, ĉar li ne ŝatas servi tie.

*15. majo.* Gazetoj raportas, ke May Miller, 17-jara laboristino estis hieraŭ arestita, akuzita pro anarkismo. Oni liberigis ŝin post kiam la Ruĝa Helpo deponis mil $-ojn ($ = dolaro); dume aliaj daŭrigis disdonadon de flugfolioj inter maristoj!

*16. majo.* Gazetoj denove raportas pri arestoj, nome de John Mideau k Lena Cleaver. Tiuj laboristoj ankaŭ disdonis flugfoliojn skribitajn kontraŭ milito k kapitalistoj k alvokas maristojn organizi sin kontraŭ la reganta klaso. Samaj gazetoj plu raportas, ke Edward S. Harkness, unu el la ĉefoj de "Standard Oil", donacis milionon da dolaroj por la skolta movado k por militpreparigo de skoltoj. La kapitalistoj deziras havi tute junan generacion, kiu estas preta defendi la riĉecon de la usonaj bankistoj.

*Louis Nagy, 13 286.*

### Produktad-krizo — salajro-redukto

257 (Esp.-Servo.) Usonaj kapitalistoj konstatis, ke la 8 000 000 senlaboruloj jam sufiĉe longan tempon malsatadas, do ili povas komenci ofensivon por redukti la salajrojn de la ankoraŭ laborantaj proletoj. En la "Wall-street"-ĵurnalo "Journal of Commerce" estis legebla: "Estas certe, ke la grandaj fabrik-posedantoj ne kapablas daŭrigi produktadon je nunaj prezoj k plu pagi nunajn salajrojn. Se ili (la kapitalistoj) ne povas pli-altigi la prezojn por komercaĵoj, tiam aŭ la laboristoj devas akcepti pli malaltajn salajrojn, aŭ de ili la pli granda parto restos senlaboruloj." La krizo fakte akriĝas pli k pli. Laŭ la "Annalist" la pogrand-prezoj en lasta jaro falis je 12 punktoj — kio kompreneble ne signifas, ke la prezoj de konsumaĵoj sam-evoluiĝis. La laboristoj kompare al salajroj ĉiam pli kare devas akiri viv-bezonaĵojn. — La "General-Motor" produktis por 95 milionojn malpli da aŭtomobiloj ol en antaŭa jaro. La prezoj de ŝtalo ankaŭ atentinde falis — pro la vendkrizo. Kapitalistaj gazetoj senmaskigas mem la krizon k timeme konstatas, ke la krizo fariĝas konstante pli severa. Kaj se eĉ kapitalistaj gazetoj tion konstatas, ni ne havas kaŭzon dubi pri fakteco de krizo en Usono ... *Louis Nagy, Novjorko.*

## EL POLIO

### Mallongaj sciigoj

258 (Esp.-Servo.) Lastatempe en vagonfabriko Zielenievski en Sanok la nombro de laboristoj estis reduktita de 2000 ĝis 600. Kaŭze de tio amasiĝis ĉ. 1000 senlaboruloj k aranĝis manifestacion antaŭ la magistrata domo. Alveninta polico donis salvon al la "ribelema" laboristaro k dispelis la amason per pafiloj, sabroj ktp. La rezulto: 6 vunditaj proletoj. — Nombro de mortakcidentoj en la karbminejoj en unua duonjaro 1929 estis 128. Kompare al sama tempo en jaro 1928 la nombro de akcidentoj pliiĝis je 4,9%. — Kiel informas Varsovia gazeto "Rabotnik" (Laboristo), deputito Snopĉinski de la sendependa bloko (porregistara) prezentis en la sejmo (parlamento) jenan projekton: 1. pliigi la nombron de drinkejoj, por ke estu unu drinkejo por 1000, k ne kiel ĝis nun unu por 2500 loĝantoj; 2. proksimigi drinkejojn al preĝejoj, lernejoj (!) k aliaj publikaj institucioj; 3. nuligi la leĝon, kiu temas pri forpreno de la koncesio sen kompenso; 4. certigi neforigeblecon al koncesi-posedantoj, kies drinkejoj ekzistas pli ol dek jarojn. La reakciuloj bone scias kion ili devas fari, por subjugi la "malsuperan" klason. — En Varsovio okazis kunveno, kunvokita de organizoj kontraŭbatalantaj komunismon, pro "religia persekutado en Sovetio". La kunvenon partoprenis delegitoj de 70 organizoj. I. a. parolis tie episkopo Ŝlagoski (Szlagoski). Oni akceptis rezolucion, en kiu estis esprimita kunsento kun la "turmentata" loĝantaro sovetia k danko al la papo por lia protesto kontraŭ religia persekutado k bolŝevika propagando. — Laŭ oficialaj informoj nur en Varsovio ĉ. 70% de loĝantoj aĉetas en magazenoj k butikoj je kredito. Jen la efiko de senlaboreco k senmoneco. — En Polio estas entute 333 malliberejoj, enhavantaj sume 36 667 lokojn. Varsovio mem posedas 36 malliberejojn. La nombro de malliberej-"loĝantoj" estas jena: en jaro 1929 sur la teritorio de "Pola Respubliko" estis arestitaj 25 073 personoj. En Varsovio sidis 7458 personoj, en Lvovo 4216, en Lublin 3266, en Vilno 3252, en Krakovo 2755, en Poznan 1712, en Torun (Torunj) 1001, en Katovice 815. En polaj malliberejoj "sidas" nun 2449 politik-"krimuloj". — En jaro 1929 elmigris el Polio al preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj 122 049 k al postmaraj landoj ĉ. 65 000, do kune 187 049 personoj. Inter la preskaŭ ducent-mil elmigrintoj estis 91 443 viroj k 89 105 virinoj. — La nombro de *registritaj* senlaboruloj atingis en marto k. j. 287 000. — Laŭ provizora kalkulo en Varsovio la nombro de senhejmaj personoj atingas 20 000, t. e. 3% de la tuta nombro de enloĝantaro.

*C. G.*

## EL ARGENTINO

### Simon Radowitzki liberigita

259 (Esp.-Servo.) Post 20-jara malliberigo en fajrolando Ushaio, K-do Simon Radowitzki estas amnestiita de la argentina respublikestro. K-do Radowitzki ne havas la permeson, resti en Argentino k intencas iri al siaj gepatroj, kiuj vivas en Milwaukee (Usono). *Laŭ "INO"-Servo.*

---

### RESPONDA PARTO

*Atentu!* K-doj signantaj raportojn por paĝo de "ES" per pseŭdonimo, nepre aparte devas sciigi al la Centrejo sian SAT-matrikulon k loĝlokon, ĉar ni devas havi certan garantion pri fidindeco de raportoj.

# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 16 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 16
Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

## Belgio

### Ŝtata buĝeto por "La Ministroj de Dio" kaj aliaj profitoj de tiuj parazitoj

Belgio estas tre malgranda lando — proksimume 30 mil kvadrataj kilometroj — k enhavas malpli ol ok milionojn da loĝantoj. Kompare kun la planedo k ĝia loĝantaro, ŝajnas, ke la nombroj ĉi supre cititaj estas sensignifaj. Tiel ne opinias la internaciaj procentegistoj k la enlimaj amatoroj de la plusvaloro. Plie tiuj lastaj ekspluatadas kvindek milionojn da negroj en Kongo — belga kolonio okdekoble pli granda ol la "patra lando".

Estu konvinkitaj, ke tiuj patriotoj konsideras la malgrandan Belgion kiel grandan orminejon, kreitan por ili de la "kara bona dio". Estas mirige vidi ilin direkti produktadon k komercadon, k "riski" monon, "tiel penege ŝparitan", en ties entreprenoj por la "gloro de la plej bela k bona patrio inter ĉiuj".

Ne ridetu, ĉar mi diris, ke kapitalistoj *riskas* monon. Ekzistas ja reala danĝero: la ribelonta proletaro — sen kiu la orminejo nenion valorus! Por submeti la laboristaron, ja ne mankas leĝistoj, juristoj, juĝistoj, oficiroj, ĝendarmoj, policistoj ktp. Sed tiuj perfortaj gardistoj "blankmanaj" ne ankoraŭ sufiĉe efikas, ankaŭ necesas dormigistoj de la ribelema penso proleta. Kaj ĉu oni povas trovi, eĉ inventi, pli efikan kloroformon intelektan ol la predikadon de la religianoj? Kredeble tiuj uloj, kies manoj estas dece blankaj, k ventroj diable dikaj, sin foroferas. Tion farante ili garantias paradizon al si mem ... en tiu ĉi mondo, la alia estas por la ceteraj ..., kiuj aĉetos enirkartojn.

* * *

En 1929, la katolikaj pastroj nombris pli ol ses mil, plie kelkdekoj da protestantoj k hebreoj. Ni aldonu, ke laŭ oficialaj statistikoj de 1920 la gemonaĥoj nombris 54 511. Sed depost 1920 ili ankoraŭ multe plinombriĝis. Iliaj predikoj estas ankaŭ fortigataj de multnombraj civilaj geinstruistoj katolikaj, ĉu de la religiaj, ĉu de la ŝtataj (nomataj: "neŭtralaj") lernejoj. Sed pri la monaĥejoj k instruado, niaj amikoj L. Bergiers k M. Van Aelst raportos. Ĉi tie, mi nur devas raporti pri la kosto de la pastraro.

Laŭ la ŝtata buĝeto de 1929, la pastraro ricevis rekte, kiel salajron, sesdek-sep milionojn da frankoj (1 germana marko = 8,50 frankoj), plie bonajn loĝejojn senpage.

Jen la kosto de la ĉefepiskopo, en Malin (Malines):

| | frankôj |
|---|---|
| Ĉefepiskopejo — kvazaŭa palaco, ho senhejma Jesuo! | ??? ??? |
| Ĉefepiskopo | 100 000 |
| Tri sekretarioj | 45 000 |
| Kvar ĝeneralaj vikarioj | 120 000 |
| Dekdu kanonikoj | 216 000 |
| Sume po jaro | 481 000 |

Ni povus daŭrigi pri la ses episkopoj. Ne bezonas, ĉu ne?

Ni nur memoru, ke la plej simpla pastro estas pli bone pagata ol instruisto "neŭtrala" k samgrada.

La subtenado al la preĝejoj estas pagata de la ŝtato, provincoj k komunumoj. La partopreno de la ŝtato dum 1929 kalkuliĝas je du milionoj da frankoj. Pri la provincoj k komunumoj mankas al mi dokumentoj.

La diversaj laboroj k objektoj internaj de la preĝejoj estas ĉiujare pagendaj de la komunumoj. La komunuma konsilantaro rajtas diskuti la jarajn elspezojn sub la direkcio de sinjoro pastro, sed ĝi ne rajtas kontroli, forĵeti, eĉ malpliigi la fakturon, ĝi devas absolute decidi la pagon! Komedio? Jes, sed ĝi estas leĝe devigata.

Nun eble vi supozas, ke la benoj, mesoj, kantadoj, funebraj servoj, mirakloj, piaj kalumnioj ktp., estante tiel bone pagataj de la ŝtato, provincoj k komunumoj — do per mono ricevita el ĝeneralaj impostoj, eĉ de ateistoj! — devas almenaŭ esti senpagaj por la naivaj kreduloj?

Se vi kredas tion, vi ankaŭ estas naivaj.

Pastroj niaj estas la plej spertaj komercistoj en la mondo.

Ili vendas altpreze objektojn sennombrajn, kiuj kostis al ili absolute nenion. Ili vendas mesojn, preĝojn k benojn; indulgojn de la papo k pardonojn de la kompata dio. Okaze de naskoj, edziĝoj, entombigoj ktp., ili postulas monon. La bonaj kristanoj devas pagi por ne fali en inferon, por eliri el pekpuriĝejo k por eniri paradizon — sen garantioj, sed estas la sola rimedo, ĉu ne?

Ni estu sinceraj! Ili ankaŭ vendas aĵojn, kiuj kostis al ili ion, k kies prezoj estas nur altigitaj ... laŭ tarifoj de la benoj: rozarioj benitaj en Lurd (franclingve: *Lourdes*, fama miraklejo, aŭ — pli bone dirite: skandalejo), medaloj de la Sankta Infaneco, statuetoj de Sankta Kristoforo, kiuj ŝirmas aŭtomobilistojn kontraŭ akcidentoj ktp. — "Ho, vi jam aĉetis ĉiujn artiklojn niajn, gesinjoroj? Estas kvazaŭa miraklo, ĉar ili estas tiel multnombraj! Neniu vendejo similas la nian. Sed jen alia fako: Donu al ni (laŭ grando de via monsako), k ni montros al vi kapon de multkapa sanktulo, pecon de la "vera kruco", unu el la sep prepucioj de Jesuo, aŭ ... fekaĵon de Sankta Mario!"

---

Ĉu estas mirige, ke por tiuj ĉarlatanoj, la membroj de la Materialista Ligo de Belgio estas delegitoj de la inferanoj?

Tamen ili insultas ankoraŭ pli sovaĝe la sovetajn liberpensulojn. Estas tute logike, ĉar tiuj K-doj ne plu pagas la vendistojn de benita akvo. Nur nia proleta revolucio forbalaos tiun malpuraĵon, kiun multobligas la kapitalista medio.

*Emile Chapelier (Ŝapelje), 9106.*

---

### Gigantaj sukcesoj de l' Ateista Unio en Ukrainio

La Unio de Sendiuloj Ukrainia kun ĉiu tago pli fariĝas amasa organizo. Tion tre elokvente elmontras jenaj nombroj:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| La 1. majo 1928 | la | Unio | havis | 50 000 | membrojn |
| „ 1. jan. 1929 | „ | „ | „ | 115 000 | „ |
| „ 1. majo 1929 | „ | „ | „ | 215 000 | „ |
| „ 1. jan. 1930 | „ | „ | „ | 523 000 | „ |
| „ 1. marto 1930 | „ | „ | „ | 723 000 | „ |

Tiel dum du jaroj la nombro de anoj al la organizo dekkvarobliĝis.

Dum la nura jaro 1929 ĝi pligrandiĝis je 335%.

Krom tio la statistiko por la 1. marto 1930 konstatas, ke en la rondetoj de junaj sendiuloj, kiuj funkcias plejparte en lernejoj, pioniraj taĉmentoj k sim. — estas 201 000 membroj.

Tiel la tuta nombro de organizitaj plenaĝaj k junaj sendiuloj superas 900 000.

*A. Pankov* (laŭ esperantlingva radiodisaŭdigo de "Radio-Ĥarkovo").

---

*Kunlaborantoj!* Kvankam en mia kajerujo amasiĝas multe da materialo, mi ne povis eldoni lasttempe nian Gazetservon pro forresto de mono. Pri tiu punkto ni devos paroli dum nia fakkunsido en Londono. Krom tio mi petas niajn kunlaborantojn verki koncize k surskribi la manuskriptojn nur sur unu flanko de la papero. Mi disponas pri valoraj artikoloj el Sovetio, inter ili ankaŭ tre longaj, sed ĉar nia Paĝo aperas dum kvin semajnoj nur unu fojon, ne estas eble publikigi ĉiujn. K-doj, kiuj interesiĝas pri tiaj artikoloj k volas aperigi ilin en gazetoj, turnu sin al mi. Ne forgesu enmeti viajn leterojn respondkuponojn, tiam la Sekcio plenumos viajn demandojn, dezirojn ktp. akurate. En *Sennacieca Pedagogia Revuo* aperas la rubriko "Edukisto kontraŭ pastroj", kiun ankaŭ gvidas nia Sekcio. Abonu tiun gazeton k kunlaboru. Sendu ĉion, kio rilatas al edukistoj k pastroj, al nia redaktanto.

# TRA ESPERANTIO

## SENNACIECA MUZEO

En la venonta jaro la laborista esperantistaro festos la 10-jaran jubileon de SAT. Kion signifas dek jaroj da SAT-movado, tion povas scii nur tiuj, kiuj fidele staris k batalis en ĝiaj vicoj de la unua momento ĝis la hodiaŭa tago. Ne estas mia celo nun k ankaŭ ne estas la ĝusta loko ĉi tie por prezenti ĉiujn atingojn k farojn de nia ankoraŭ tiom juna movado. Tion sendube faros niaj historiistoj. Sed nia devo estas okaze de ĉi tiu nia jubilea festo aranĝi ion, kio markus la gravon de la momento k respondus la spiriton de nia movado, kunigante tiele la dankemon k la konscion de la SAT-anaro al la movado k la neceson k utilon de ĝia kultur-liberiga laboro. Malmultvorte: Fondu ni la Sennaciecan Muzeon okaze de l' 10-jara ekzistado de nia movado. Kiel signon de sindonemo al nia organizo ni streĉu ĉiujn niajn fortojn por starigi gravan institucion, kiu estu la koro k cerbo de nia tutmonda organizo. Kun la plikresko de l' batalo por la laborista hegemonio[1] evidentiĝas ĉiam pli k pli nia rolo, k estas agnoskata k firmigita per la efektivo la ĝusto de niaj programo sennacieca k prolet-kulturaj taskoj, per kies plenumo ni plifortigas la kadrojn de la batalanta laboristaro, estante kleraj, konsciaj k neŝanceleblaj revoluciuloj. Estos nia Sennacieca Muzeo ne sole arkivejo de SAT-eldonoj k ĝeneralaj esperantaĵoj, sed klerig- k batal-instituto, el kiu ĉerpos scion k kuraĝon la nuntempa generacio k kiu servos per la abundo da spertoj k riĉo je materialo kiel vojmontrilo por la estonta generacio.

Montru ni per ĉi tiu faro, ke SAT elpaŝis el la malvasta vojeto de intermembra agado. Per kreo de Senn. Muzeo ni, priservante nin, ekiros la gravan paŝon al la tutmonda proletaro, por lernigi ĝin k atentigi ĝin je nia agado. SAT fariĝos vere tia, kia ĝi celas esti, dank' al tiu Muzeo.

Okaze de la 10-jara jubileo de SAT nia devizo estu: Fondu Sennaciecan Muzeon! *I. Jurysta (227).*

[1] Superregado.

9-a vol. Serio: Scienco. Biblioteko de Sennaciulo

**REVOLUCIO EN LA LINGVOSCIENCO**

Jafetida lingvoteorio de akademiano N. Marr. Skizo de A. P. Andreev. 68 paĝoj. — Prezo: **0,60 mk. g.**

*Mendu tuj ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27, Germanio. Sovetianoj mendu rekte ĉe CK SEU, Poŝtkesto 630, Moskvo.*

## "KOMSOMOLSKAJA PRAVDA" MALATENTAS LA LABORISTAN ESP. MOVADON

Responde al mia artikolo "Nova elpaŝo kontraŭ esperanto"[1] mi ricevis 13 leterojn el 8 landoj: Aŭstrio, Bulgario, Francio, Germanio, Nederlando, Sovetio, Svisio k Usono. Estas aparte notindaj la kolektivaj leteroj de lab. junularo el Plovdiv (Bulg.), Lab. Esp.-Grupo el Munĥeno (Germ.) k Nederlandaj lab. esp-istoj. Tiu lasta — kun 52 subskriboj.

Ĉiuj K-doj flame protestis kontraŭ propagando de esp-o kiel netaŭga ilo por laborista interfratiĝo, per faktoj pruvante la malon. Sendube ĉiujn leterojn mi tradukis rusen k sendis al redakcio de "Komsomolskaja Pravda", petante, ke ĝi konsideru ilin k presigu sian opinion pri la afero, ĉar ja tiuj leteroj estas la voĉoj de multaj laboristoj k al la centra organo de sovetia komjunularo ne decas prisilentadi tiun gravaĵon.

De la redakcio mi ricevis nur malgrandan noteton de la 7. 4. kun jena teksto: "K-do Nikitin! Ambaŭ viajn notojn ni transsendis al K-dino N. K Krupskaja k petis ŝin doni al vi la respondon. Sekret. de la Red."

Tiu ĉi noteto klare montras, ke la red. mem sin kaŝas post la dorso de la aŭtoritato k aŭ ne havas aŭ timas laŭte eldiri sian opinion.

Mi scias, ke K-dino Krupskaja nuntempe estas tre okupita per gravaj problemoj pri nuna stato de popolklerigado en Sovetio k ne havas la tempon por tuj respondi, sed la redakcio ja devas deklari, ĉu ĝi estas solidarema kun ŝia opinio pri esp-o aŭ ĝi havas ian propran. Pro tio mi ree k ree postulis la respondon de "Koms. Pr." k lastan fojon (la kvinan) mi sendis poŝtkarton eĉ "kun afrankita respondo". Sed ĝis nun ni ricevis neniun respondon. Do, ni povas konstati, ke "Koms. Pr." tute malatentas nian movadon.

Nun, Gek-doj, mem decidu, ĉu ni daŭrigu sendi plurajn protestojn k postulojn al la redakcio, aŭ ni daŭrigu nian laboron por utilo k bono de la laborista klaso en tutmondo, malgraŭ ke kelkaj komjunul-gvidantoj nin ne komprenas . . .

Al ĉiuj K-doj sendintaj al mi leterojn, mi sendas sennaciecan saluton, dankon k petas pardonon pro tiom longa mia silento; sed mi ne kulpas, ĉar ĝis nun mi estis atendanta la respondon de la redakcio.

*A. S. Nikitin (12 408).*

[1] Vidu n-on 282.

## GERMANIAJ ABONANTOJ

ATENTU

*Por simpligi la administrajn laborojn ni transdonis la ekspedadon de gazetoj por granda parto de la germania abonantaro al la poŝta gazetservo, kiu distribuas "S-ulo"n k liveras ĝin al la abonantoj sen banderolo. Ni nur devas transdoni al la poŝtejo difinitan kvanton da ekzempleroj.*

*Tiu ĉi procedo ankaŭ sekvigas malavantaĝon, ke ni ne plu povas admoni ĉiun abonanton enmetante en la gazeto pagilon, sed devas atentigi la abonantojn per aparta koverto. Sed ĉiu abonanto povas subteni nin per akurata renovigo de la abono k kiel eble plej frue. Kiuj povas pagi la abonon por pli longa tempo, tiuj faru tion. Kiu ne tuj havas la monon por pagi la abonon, tiu almenaŭ sufiĉe frue informu nin pri tio, por ke ni ne estu devigataj malregistri la nomon ĉe la poŝto. Interrompo de livero kaŭzas multan, nenecesan laboron k tial ĉiu celu eviti tion.*

*Kiu ne plu deziras aboni la gazeton, tiu simple malakceptu la gazeton al li portitan de l' poŝtisto.*

*P l e n d o j n pri neakurata livero de "S-ulo" direktu u n u e al via poŝtisto, kiu devas zorgi pri laŭorda aliro de la ekzempleroj. Malpurajn k difektitajn ekzemplerojn ne akceptu, sed plendu ĉe la poŝtisto postulante bonkvalitan n-on. Agante tiel, vi certe garantias al vi regulan k ordan liveron.*

*Ĉi-okaze ni denove informas niajn legantojn, ke "S-ulo" povas esti ankaŭ mendata ĉe ĉiu poŝtejo en Germanio.*

**Renovigu tuj por la 3. kvaronjaro!**

### Komuniko de la Direkcio

*Ni sciigas la membraron, ke en sia kunveno de 7. de majo 1930 la Leipziga SAT-anaro elektis kiel revizorojn por la kontolibra kontrolado ĉe la Administracio de SAT jenajn tri anojn (loĝantaj ĉiuj en Leipzig): K-do W. K r e y (5486), K-dino E. T e i c h m a n n (2055), K-dino H e d w. K u n a t h (15 698). Ĉar ili senprokraste komencas siajn reviziajn laborojn, la raporto prezentota de la Administranto ĉe la Kongreso en Londono montros nombrojn k sumojn kontrolitajn k konfirmitajn de la revizoroj. Sekve estas forigita la manko, pri kiu ni mem devis atentigi en nia raporto al la Leipziga Kongreso (vd. n-on 256, p. 483).*

**Korekto.** En n-o 295, p. 396, unua kolono, lin. 6 de malsupre, legu, anstataŭ "en la materio" — en *tiu fako*.

**Ni ne dormu somere!**

Estas malnova nia kutimo, post vintra streĉa laboro, somere kapti ĉiun okazon por ripozi k fortikigi nian sanon. Sed bedaŭrinde multaj el ni Ge-SAT-anoj ripozas tiel bonege, ke ili tute lasas ĉian agadon por nia movado. Tio kompreneble speguliĝas nefavore en nia aŭtuna propagando, kiam ni ree aŭdos la signalvortojn: Varbu, abonu, abonigu, ktp.

Ĉu tiel povas daŭri? Certe ne. Ripozante, saniĝante, ni ne forgesu tute nian aferon. Ne temas aranĝi kursojn; someraj kursoj ja kutime ne estas sukcesplenaj; temas prepari nian aŭtunan plantejon. Ja ĉiuj fabrikoj k organizoj funkcias somere. Do kolektiva korespondado de laborejo aŭ grupo eblas: Ni ĉiam povas proponi k aranĝi tian korespondadon (nur kolektivan). Ni estu iniciatantoj, interligantoj, perantoj. Ĉu tio estas malfacila?

En mia oficejo, ekzemple, kolektive korespondas komjunularo, partio, virinaro, sendiularo, IRH-anaro. La leteroj estas subskribataj de multaj homoj k la intereso estas grandega. Se tiu korespondado daŭras dum la tuta somero, la aŭtuna kurso certe havos brilan rezulton. La lernontoj estos fervoraj, ĉar ili jam spertis la praktikan utilon de nia lingvo kiel interligilo tutmonda. Dume korespondante nacilingve k nur subskribante esp-an tradukon, ili jam partoprenas nian movadon. Tiel, nur perante kolektivan korespondon, ni fakte faras grandan propagandon k varblaboron, ne streĉante multe nian forton. Do, kolektiva korespondo estu nia somera tasko.

*P. Tilin (9310).*

---

**Gravaj esperanto-gazetoj parolas pri nia movado**

En n-o 20 (568) de "Heroldo de Esperanto" (de 16. majo) aperis fruntpaĝe sufiĉe ampleksa artikolo, verkita de "SAT-simpatianto", kiu priskribas historion k agadon de SAT.

En maja n-o de la UEA-gazeto "Esperanto" (Ĝenevo) troviĝas 26-linia laŭda recenzo pri nia *Jarlibro*.

Tiuj notoj montras, ke la periodo, en kiu oni ĉe la verda esperantistaro ŝatis prisilenti SAT, definitive forpasis.

---

**Supersignoj en la skribo**

postulas plumtranslokigon tempomalŝparan. Min, verdire, neniam ĉagrenis tiu afero, k mi ne konsideris ĝin priokupinda problemo. Sed por helpi la skribmanieran evoluon, mi proponas reformeton, kiu povas kontentigi la sensignemulojn. (La signoj presmaniere ne estas reprodukteblaj sen kliŝo, tro kosta. — *Red.*) Por *Ŭ, ŭ* mi ne trovas solvon, k tiu por *Ĉ, ĉ* ne kontentigas min multe. Interesataj K-doj bonvolu konigi sian opinion pri eblo esprimi skribe la supersignajn literojn, ne translokigante la plumon.

*Amado Hernandez (10 502).*

**TRA LA MOVADO**

(Kroniko)

*SVEDIO.* Kiel jam menciite, la socialdemokrata partio decidis morale subteni la esp. movadon dum sia kongreso en 1928. Depost tiu tempo nia movado marŝegis en nia lando. La esp. kursoj de A.B.F. (klerig-asocio) superis tiujn de aliaj lingvoj, pluraj fremdlandaj instruistoj faris kursojn en div. rondoj, k la esp. organizoj kreskegis. Per klopodoj de nia energia parlamentano K-do Ernst Eriksson ni sukcesis nun fine ankaŭ enpenetri la gazetajn rondojn. Kune kun K-do John Johansson, kiu ellaboris kurson por la gazetlegantoj, K-do Eriksson sukcesis konvinki la ĉefredaktorojn de l' socialdemokrata gazetaro en Svedio pri la utilo presi kurson en la kolonoj, kiu komenciĝis en komenco de majo. Jenaj gazetoj nun enpresis aŭ enpresos en aŭtuno la kurson: *Socialdemokraten* k *Arbetaren*, (Stockholm), *Arbetarbladet*, (Gävle), *Aurora*, (Ystad), *Norrländska Socialdemokraten* (Boden), *Nya Samhället* (Sundsvall), *Skanska Socialdemokraten* (Hälsingborg), *Smalands Folkblad* (Jönköping), *Västerbottens Folkblad* (Umea), *Östergötlands Folkblad* (Norrköping), *Gottlands Folkblad* (Visby), *Skaraborgaren* (Falköping), *Västgöta-Demokraten* (Boras), *Enköpings Nyheter* (Enköping), *Nya Norrland* (Sollefteа); sume dekkvin gazetoj kun legantaro preskaŭ duonmiliona. Per la kurso multaj homoj havos eblon ekkoni la facilon de nia lingvo, k verŝajne la kurso faros bonan propagandon por aliaj dum-aŭtunaj kursoj.

*Korekto.* Sub "Kroniko" en n-o 279 (p. 223) devas teksti: 555 esp-istoj troviĝas en *lando* Niĵni-Novgoroda (anstataŭ: *distrikto*), ĉar en "lando" eniras 7 distriktoj k 3 aŭtonomiaj regionoj k respublikoj. La eraro povis okazi pro la konata konfuzo reganta pri esp-igo de administro-teritoriaj terminoj.

---

**ĈE LA NEŬTRALULOJ**

La mondfama filmproduktanto Karlo Lemle (*Laemmle*) de l' "Universala Film-Korporacio" per intervjuo en filmurbo apud Los Angeles esprimis sian esperon, ke esp-aj parolfilmoj fariĝos pli multnombraj post la unua eksperimento de "Paramount", k opinias, ke esp-o estos la plej efika ilo por ebligi mondpacon.

*

En kurso ĉe la polica lernejo en Tallinn enregistriĝis 206 policistoj el ĉiuj fakoj de la polico. 140 personoj fakte studas en 4 grupoj laŭ la Ĉe-metodo.

*

En *Utrecht* (Holando). S-o Ĉe finis sian kurson kun 101 personoj, en *Arnhem* kun 150 partoprenantoj, inter ili policistoj k ĵurnalistoj. En ĉi lasta urbo okazos de 17.—29. julio la dua internacia pedagogia kurso de Ĉe por profesiaj geinstruistoj.

**Suplemento al la adresaro en Jarlibro**

**(Tiu ĉi nomaro ne estas por korespondemuloj)**

(Dua parto. 9-a daŭrigo. Vidu n-on 284/95)

**Marseille** (Francio)
16292 *Pelletier L.*, 17 rue Beauséjour, quart. Menpenti.
**Meissen** (Germanio)
16131 *Heinemann Karl*, Meisastr. 34, kompostisto.
**Meudon Val Fleury** (S. et O., Francio)
16224 *Cvetkov Mloden*, 24 avenue J. d'Arc.
**Minsk** (Sovetio)
16239 *Danilĉik Nikolao*, Sovetskaja 144-a, kv. 1.
16238 *Elkind Ilja*, Leningradskaja 4, kv. 5.
**Montevideo** (Urugvajo)
16115 *Benages Jose*, Calla Canelones 1003.
16114 **Staub Rozalio*, Casilla Coreo 208.
**Moreland East N. 13** (Victoria, Aŭstralio)
16187 *Audley H.*, Butler Grove 7, vojaĝkomercisto.
**Moskvo** (Sovetio)
1513 *Karantbajvel I.*, B. Gnezdnikovskij 10, kv. 228, 9.
16078 *Lavrentiev K. A.*, Saĥov. Samotĉenaja 2/12, kv.13.
16002 *Slobodĉikov B.*, Spartokovskaja ul. 18, kv. 3, 66.
**Mürzzuschlag** (Aŭstrio)
16136 *Ĉerny Johann*, Nansenstr. 9, seruristo.
16282 *Gruber Johann*, Wiener Str. 76, fervojisto.
**Nancy** (Francio)
16072 *Bernardon Paul*, 2 rue Drouin (Maison du Peuple), metalisto.
16074 *Kresch*, rue Erckmann Chatrian, laboristo.
16076 *Meloni Gino*, 2 rue Drouin (Maison du Peuple).
16075 *Thibonnet Pierre*, 2 rue de Drouin (Maison du Peuple), oficisto.
16073 *Vuillaum Gaston*, 17 rue de Saverne, ŝuisto.
**Naro-Fominsk** (Sovetio)
15715 *Apaev A.*, str. Uricka 2.
**Neumünster** (Holstein, Germanio)
15999 *Meisner Karl*, Fabrikstr. 37, tornisto.
**New Jersey** (Usono)
16017 **Bede Elizabeto*, 250 Cristopher Str. Montclair.
**New Malden** (Surrey, Britio)
16165 **Page*, Stanley Avenue 25.
16164 *Page Aleksandro*, Stanley Avenue 25, farmaciisto.
**Newton Abbott** (Devon, Britio)
16166 **Medland H.*, Hillmans Rd. 40.
**New York** (Usono)
16153 *Andersen Anton*, 822-58 St., Brooklyn.
16152 *Brown Morris*, 146, W. 16 St., City.
16016 *Kiss N.*, Esp. Rondo, 350 East, 81 st. Str., City.
**Niedereinsiedel** (Ĉeĥoslovakio)
16278 *Schöne Josefo*, Schänkberg 183, laboristo.
**Nikolaev** (Sovetio)
16266 *Gatinskij Leonido*, Proletarskaja 12, laboristo.
**Nikopol** (Sovetio)
16158 *Gomberg Avraam*, Rajparkom ĉ. 5, horloĝisto.
**Norwalk** (Kalifornio, Usono)
16286 *Seall Earl*, 638, 2 nd. Avenue.
**Nottingham** (Britio)
16080 *Bull Harry*, 6 Sabina Terrace, metaltornisto.
16079 *Kemble, E.*, 67 Hilton Road, Mapperley, presisto.
**Novosibirsk** (Sovetio)
16012 *Bugoslavski A. M.*, ul. Romanova 13, oficisto.
16247 *Skovarodov P. A.*, Relsovaja ul. 2-d, teknikisto.
**Nürnberg** (Germanio)
15992 *Müller Friedrich*, Prätoriusstr. 15/1, seruristo.
16299 *Wittig Georg*, O. Krämergasse 9, seruristo.
**Odessa** (Sovetio)
16090 *Nikulin Gr.*, Sadikovskaja str. 40, kudraĵisto.
16091 *Ŝkolenko Aleks.*, ul. Ivanova 7/13, studento.
**Okajama** (Japanio)
16129 *Komatsubara H.*, Yoŝida-mura, Ŝinpo 516, instr.
**Olakovo** (Sovetio)
16209 *Komlev Nikolao P.*, laboristo.
**Omsk** (Sovetio)
16345 *Botvinik Solomon*, 1 linio 84, butonisto.
6564 *Kulakov Petro*, Ustkamenogorskaja 4, instruisto.
16259 *Lebedev Johano*, 5 linio 38, asekur-agento.
16344 *Skalskij Apolono*, Prolomnaja 147, kuracisto.
**Opoĉka** (Pskov. okr., Sovetio)
16009 *Ŝumilov N.*, Poŝtkesto 3, sovĥoz "Krasnij Paĥar"
**Osaka** (Japanio)
16059 *Niŝida-Hideo*, Taiheijo Kaiĵo, Kasai Haken (3-ĉome Doĵima-hana).
11839 *Oosaki-Kazuo*, Daitô-Kaiĵô, Oe-biru, Kinugasa-ĉo.
16058 *Sasaki Sukemasa*, Sumitono Densen Seizo-ŝo, Ŝikanzima.
**Oybin** (Saksio, Germanio)
16274 *Gaida Karl*, Langestr. 77/2, laboristo.
**Palafrugell** (Hispanio)
16294 *Püignaŭ F. L.*, Pi y Margall 40, korklaboristo.
**Paris** (Francio)
3482 **Brochet Adolphine*, rue d'Avron 73.
16178 *Louchard Lucien*, rue de Romainville 9, 19.
**Pärnu** (Estonio)
16281 *Munak Arnold*, Karuselstr. 16, agento.
**Pasadena** (Kalifornio, Usono)
16288 *Betts E. L.*, 1044 E. Howard Str.
**Pausitz, Post Riesa** (Germanio)
15984 *Grosse Willi*, Schulgasse 7, instruisto.
**Pegau** (Saksio, Germanio)
2383 *Hellriegel E.*, Eulauer Str. 9, veturilfaristo.
**Penzig O.-L.** (Germanio)
16227 *Brose Walter*, Görlitzer Str. 39, veturilfaristo.
**Pjatiĥatka** (Krivoroga distr., Sovetio)
16161 *Ilina R. A.*, Trudŝkola.
**Poklaevskaja** (Sovetio)
10168 *Javurek F.*, Djetskij Gorodok, Permsk. ĵel. dor.
**Poltava** (Sovetio)
16006 *Gavrilenko A.*, Proletarskaja Sokolov per. 6, elektristo.
**Portugalete** (Vizcaja, Hispanio)
16263 *Hernaez Ed.*, str. Villanuevo 14, ferlaboristo.

(Daŭrigota)

## MEMORNOTO

**Represis el "S-ulo":**

*Der Volkslehrer* (instruista sind. gaz.), Langensalza, 11. 5., El la praktika vivo (285); *Krasnij Altaj*, Novosibirsk, 1. 5., El lando de krizo (Polio) (288); *Spartacus* (hung. klubgaz.), Novjorko, majo, Esp. Traktoro (275); *Uj Elöre*, Novjorko, 6. 5., El Taĝikio, 9. 5., Bulg. teroro; *Volksstimme*, Chemnitz, 6. 1., Infanekspl. en Italio, 7. 2., 10. 2., 25. 2. (el Esp.-Servo); *Sächs. Volksblatt*, Zwickau, 21. 12., 23. 12., 21. 1. (el Esp.-Servo); *Muldenthaler Nachr.*, Lunzenau, 29. 3. (Esp.-Servo); *O. Povo*, Lisbono, 28. 2., La kalamkaro (276), 12. 3., Estonta militarmilo (281), 28. 3., Diversaĵoj (281), Rekordrikoltoj (273), 18. 4., El praktika vivo (I), (285).

**Represis el "La Lern.":**

*O Povo*, Lisbono, 28. 3., pri bapto (13)

**Priesper. artik. k notojn enhavis:**

*Der Eisenbahner*, Wien, 9. 5. (alvoko en esp.); *Signalen*, Stokh., 15. 5.; *Accion Cooperatista*, Barcel., 16. 5.; *Vojovniĉij Bezvirnik*, Kiev (liberpens.), 20. 4. (ankaŭ peresp. mat.); *Udarnik*, Kiev, n-o 6; *Daily Worker*, London, 17. 5.; *Uj Elöre*, Novj., 1. 5., 5. 5.; *New York Times*, 27. 4.; *O Seculo*, *Lisbono*, 24. 3., 28. 3., 15. 4., 20. 4.; *Diario de Noticias*, Lisb., 18. 3., 20. 3., 21. 3., 28. 3., 2. 4.; *Diario de Lisboa*, 8. 4., 15. 4.; *O Globo*, Lisb., 9. 2., 23. 2., 8. 3.; *Burgstädter Anzeiger*, 27. 11.; *Glauchauer Ztg.*, 29. 11.; *Muldenth. Nachr.*, 18. 12., 16. 1., 29. 3.; *Crimmitsch. Ztg.*, 18. 12., 22. 1.; *Volksstimme*, Chemnitz, de jan. ĝis marto 10 notoj; *Sächs. Volksbl.*, Zwickau, de jan. ĝis marto 4 notoj; *Limbacher Tagebl.*, 5. 2.

**Pri SAT enpresis:**

*O Povo*, Lisbono, 24. 2.

**Peresper. materialon enpresis:**

*Krasnij Altaj*, Novosibirsk, 1. 5.; *La* Protesta, Buenos Aires, 18. 4.; *The Los Angeles Citizen*, 9. 5. (Esp.-Servo 289); *Uj Elöre*, Novj., 8. 5.; *Daily Worker*, Novjorko, 1. 5., 2. 5.; *Turkmensakaja Iskra*, Aŝhabad, 1. 5.; *Udarnik*, Tuapse, 1. 5.

## NIA POŜTO

*Peredelci.* Via subskribo estas tute nelegebla. Skribu la adr. pres-k latinlitere. Al viaj demandoj: 1. Temas pri apartigo Sind-on de la prov. de B.; 2. La Konvencio volas ĥuligi la dividon je hinduismana k mahometana grupoj k forigi specialajn mahomet. privilegiojn (Vd. pri tio en n-o 291, p. 351).

*15 618.* — Certe via artikolo aperos.

*2121.* — Ni uzos siavice vian "Tagon".

*15 428.* — Ni uzos vian div. materialon, tiom kiom la loko permesos. Kliŝo alvenis.

*7537 k aliaj.* — Vi devus sendi raportetojn destinitajn por *Paĝo de Esperanto-Servo* rekte al ties redaktoro, kiu sola estas respondeca pri la enhavo de tiu Paĝo k decidas pri uzo aŭ neuzo de tiu aŭ alia manuskripto. Ĝuste adresante vi evitas prokraston. *Red.*

*7381.* — Ni ne kulpas. Antaŭ 4 semajnoj ni ricevis la lastajn listojn el Moskvo.

*15 998.* — Via PK ne taŭgas por resp. — Malnovaj numeroj de Senn. Revuo tute elĉerpitaj. *Adm.*

**Atentigo! K-doj metu sur siaj leteroj al la Redakcio ĉiam siajn nomon k adreson!**

**La multkoloraj, ilustritaj poŝtkartoj de SAT**

estas unika provo, bilde esprimi nian idealon. En la korespondado kun varbotoj tiuj kartoj estos tre utilaj al vi. Tial aĉetu ilin ĉe la **Administrejo de SAT,** R. Lerchner, Colmstr. 1, **Leipzig O 27.** La kompleta serio, konsistanta el 5 diversaj kartoj, kostas **0,50** g. mk.

### Nekrologo

La 27-an de majo mortis, 28-jara, en Marseille, post teruregaj suferoj, unu el niaj plej malnovaj k fervoraj SAT-anoj

**RAVEL LEONO (5326)**

Malsana de sia naskiĝo, k fizike treege malforta, li tamen serioze lernis esp-on k ĝin propagandis en ĉiuj lab. rondoj, ĉar li komprenis la gravon de nia lingvo por la liberigo de l' homaro. Li kuraĝe k senĉese luktis kontraŭ la rena tuberkulozo, kiu jam de longe trafis lin. Devigata perlabori sian vivon malgraŭ tio, li montris ĉiuokaze grandegan kuraĝon k nekredeblan energion. Li neniam forlasis la SAT-anajn vicojn, kiel multaj aliaj. Se li ne vivis dum multaj jaroj, li tamen mortis kun la certo, ke li faris ion utilan dum sia mallonga vivo, k tiu penso multe mildigis liajn suferojn dum la lastaj tagoj. Li deziris, ke lia SAT-insigno lin akompanu en la ĉerko.

Ni honoru lian memoron, ĉiam pli fervore propagandante nian lingvon k uzante ĝin en la servo de l' tutmonda proletaro.

**Lab. Esp. Grupo en Marseille.**

**La nove arangita SAT-kurso en Mylau (Vgtl.)**

al kiu partoprenas malnovaj membroj k novuloj, koresp. kun siaj labor-gefratoj en la tuta mondo. Pri ĉ. temoj, ĉu politiko, arto, sporto, kooperativo, sindikato ktp., interŝ. fotojn, nac. il. gazetojn, PM. — La Gek-doj en Alĝerio, Usono, Hispanio, Japanio k en nordaj landoj estas precipe petataj koresp. kun ni, bfl. — *Ĉiu resp.-letero de ni enhavos grandan surprizajon por la adresato!* Skribu tuj al: SAT-grupo de Esperanto, gvid. K-do Robert Dietz, Kiesgrube, Neubau, 3, *Mylau*, Vogtlando (Germanio).

**JARABONO**

por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.

**Ankaŭ ¼-jare abonebla!**

## KORESPONDADO

**ĈEĤOSLOVAKIO**

K-do Rudolf Burkert, *Dobruŝka* sciigas al ĉ. koresp-antoj, ke al li nun ne estas eble respondi pro vojaĝado dum tri monatoj, sed tiam nepre skribos. — Saluton!

**FRANCIO**

*Atentu!* Mi ricevis je mia anonco en n-o 288 proks. 60 PK k L, precipe el Sovetio. Dankante al la skribintoj, mi bedaŭras ne povi koresp. kun ĉiuj. K-do Z. Fisz, *Metz*.

**GERMANIO**

K-do Alfred Rössler, ree loĝas en *Esslingen/N.*, Kupferstr. 8. Gesovetianoj daŭrigu la koresp-adon!

K-do *Fr. Meier* (22-jara sportulo), Fritz-Reuter-Str. 27, *Rostock*, dez. koresp. kĉl. gekamaradoj, PI, L.

**NEDERLANDO**

K-do *H. V. Santen*, Columbusplein 33; *Amsterdam-W.* dez. koresp. kun Tolstojanoj k teozofoj, nur el Sovetio.

**POLIO**

— Grupo el 30 perfektiĝantaj lab. esp-istoj koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantias K-do 14 506. Adr.: Leo Bornŝtajn, ul. Konstantynovska. 45, *Lodz*.

**RUMANIO**

K-do *Eugeno Ferenczi*, Str. Eminescu 6, *Arad*, interŝ. PI, PM, fotojn kun tutmondaj gesamideanoj. Diskutas pri div. temoj.

**KIU INTERESIĜAS**

pri historiaj SAT-dokumentoj, — la malnovaj kajeroj de l' antaŭulo de SENNACIULO:

**SENNACIECA REVUO?**

*Kompletaj* serioj estas livereblaj! Pri prezo k precizaj informoj oni turnu sin al: K-do J. Habert, avenue de la Somme 30, *Sucy* (S. et O.), Francio.

**Letervespero**

**por eŭropanoj kaj ekstereŭropanoj**

Laborista Esperanto-Grupo Pirmasens (Pfalz) aranĝos la 3. julio por eŭropanoj k la 7. aŭgusto por ekstereŭropanoj letervesperon pri ĉ. temoj. — Gek-doj el ĉ. landoj, sendu multnombre L, PK, PI, gaz., ĵurnalojn al: K-do Friedrich Kärcher, Homärtelstr. 16, *Pirmasens* (Pfalz), Germanio. — *Ni certe respondos!*

**ENHAVO:**

| | pago |
|---|---|
| Kiam ni atingos la kvinan milon? | 417—418 |
| La Stokholma ekspozicio . . . . . . | 418 |
| Klarigoj, komentoj, respondoj . . . . | 419 |
| Patriotismo . . . . . . . . . | 419—420 |
| La evoluo sen dio . . . . . . . | 419—420 |
| Anarkismo pri Sennaciismo . . . | 420—421 |
| Libera sen-antaŭjuĝa mondo . . . . | 421 |
| Esperanto-Servo . . . . . . . . . | 422 |
| Sennaciula Liberpensula Paĝo . . . . | 423 |
| Tra Esperantio . . . . . . . . | 424—426 |

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)